
DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

# BOLETÍN

AÑO 38 Nº 273 ENERO — FEBRERO 1986







**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

Dirección y administración
Carreras Candi, 34 – 36
08028 BARCELONA

REDACTOR JEFE
Giordano Moya
Balmes, 38 Tel. (93) 7881839
TERRASSA (Barcelona)

COMITE DE REDACCION
Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Marco Botella

**ENHAVO**

La kovrilo: Membroj de la L.K.K. kaj la bildkarto de la 46a Hispana Kongreso en Vigo

| | Paĝo |
|---|---|
| Ni esperantistoj | 3 |
| Pensoj de Zamenhof | 5 |
| Disertaĵo de A. Alonso Nuñez | 6 |
| 46a Kongreso en Vigo | 11 |
| Io pri nia nunjara Kongreso de E-o | 12 |
| 71a Universala Kongreso de E-o | 16 |
| 59a SAT - Kongreso | 17 |
| 47a Hispana Kongreso de E-o | 19 |
| HEF – Sidejo en Barcelono | 22 |
| La Familio de Pascual Duarte | 25 |
| Parolu E-on | 27 |

Depósito Legal: VA. 616 – 1978
G.E.T.

UTILAJ ADRESOJ

Hispana Esperanto-Federacio
Carreras Candi, 34-36
Tel. (93) 2402662
08028 BARCELONA

PREZIDANTO
Salvador Aragay i Galbany

VICPREZIDANTO
Luis María Hernández Izal

SEKRETARIO
Víctor Ruiz Rodriguez

VICSEKRETARIO
Josep Miranda Calvo

KASISTO
Joan Font Civit

Pagojn sendu al
Caja de Pensiones para la Vejez y de Ahorros
Libreta n° 2.303-26
Agencia Riera Blanca, 436
08028 BARCELONA

LIBRO–SERVO DE H.E.F.
Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID

Pagojn por Libro-Servo:
Cuenta Postal 3.118.078 VALLADOLID

ELDONA FAKO
Inés Gastón
P° de la Constitución 35-4°
50001 ZARAGOZA

ĈEFDELEGITO DE U.E.A. EN HISPANUJO
Juan Azcuénaga Vierna
Gral. Dávila 127, portal 7, 2° iz.
Tel. (942) 339487
Cuenta Postal 03548531
39007 SANTANDER

INFORMA–FAKO
Enrique Piquero Vázquez
Asín y Palacios 8-6° A
50009 ZARAGOZA

OFICEJO
Rodríguez San Pedro, 13-3° P.7
28015 MADRID

# NI ESPERANTISTOJ

**La jaro 1986 estis deklarita de UN "Jaro de la Paco"**

La UN proklamis tiun ĉi jaron 1986 "Jaro de la Paco". Akorde kun tiu deklaro, la temo de la 71a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, estos: "interkompreniĝo, paco, evoluo". Kion, en Hispanujo, la esperantistoj faros por la paco?

Por ni, esperantistoj, ne nur 1986, sed ĉiu jaro devas esti jaro de la paco aŭ tutjara klopodado por la paco. La paco estas nia celo; klare tion montras nia himno "La Espero". Laŭ Zamenhof, la lingvo estas la ilo por disvastigi tiun novan senton de paco tra la mondo. Tiu impulso por la paco, kiu devas disvastiĝi tra la tuta mondo, oni preskaŭ forgesis.

Post la fondiĝo de Esperanto antaŭ 99 jaroj, okazis du mondmilitoj kaj la danĝero de ekstermonta atom-nuklea mondmilito minacas la baldaŭan estontecon. La celo de la esperantismo: "La popoloj faros en konsento, unu grandan rondon familian" restas for de nia agado, kvankam tiu celado estas hodiaŭ multe pli necesa ol kiam "La Espero" formulis ĝin.

Antaŭ la centjariĝo ni nepre vekiĝu el nia rutino kaj faru al ni mem gravajn demandojn. Ilin ni eltiris el nova revuo: kial mi estas esperantisto?, kion mi esperas de la venko de Esperanto?, kio estas esperanto?, kial Esperanto estas multe pli ol la Internacia lingvo?, ktp.

Laŭvide, la esperantistoj multe klopodas por instrui la lingvon, sed malmulte aŭ eĉ ne parolas pri ĝia idea flanko. Ĉu ni hontas pri ia eksmoda romantikisma idearo de la pasinta jarcento?

Krom la lingvo mi devas studi la verkaron de Zamenhof. La japana eldono de la plena verkaro de Zamenhof faciligos al ni la taskon. El ĝi ni eltiros "Pensoj de Zamenhof".

Eble oni povas trovi la idealon de Zamenhof tro optimisma, sed se antaŭ la unua mondmilito la esperantismo povis esti revo, post unu jarcento, ĝi fariĝis nepra klopodado, kiel la ĝenerala etika devo de nia tempo. En nia konvulsia epoko, oni riskas la pluan ekzistadon de la homaro. Nia mondo plu estas dispartigita, kun freneza kreskanta armado. Esense la tutmonda vetarmado respegulas la lukton de interesoj por la regpovo kaj la tutmonda hegemonio.

Ne plu la voĉo de la esperantismo devas silenti. Laŭte tra la tuta mondo, super la landlimojn kaj la

kaosa babelo de lingvoj, super la hegemoniaj lingvoj, la esperantismo devas ne plu ignori la ĝeneralan frenezecon kaj montri ĉie, ke la fundamentaj interesoj de la homaro troviĝas super tiuj mizeraj agadoj de la regpotenculoj.

La celo de la esperantismo jam ne plu povas resti pasiva romantika sentimentaleco ĝi devas fariĝi ĝenerala morala devo tutmonda kaj la lingvo, ĝia disvastigilo.

Antaŭ la dua centjaro ni faru al ni mem konscian ekzamenon pri la diritaj demandoj.

La esperantismo estas multe pli ol lingvo internacia. Ĝi estas revo por la homaro: "Al la mond'eterne militanta. Ĝi promesas sanktan harmonion". Sub tiu flago la esperantismo devas reakiri sian impeton por fariĝi la historia faktoro por la paco. Nur la altaj celoj, povas doni la forton por grandaj movadoj.

Ni, do, antaŭen!

**G.M.E.**

NOTO DE LA REDAKCIO: Tial, ke la paco havas fortan interrilatiĝon kun la esperantismo, en okazo de 1986 "Jaro de la Paco", ni invitas al niaj kunlaborantoj kaj ĝenerale al ĉiu membro de HEF, esprimi per mallongaj artikoletoj sian vidpunkton pri la temo: "La esperantismo kiel rimedo por la mondpaco". Dankon!

# HEF – SIDEJO EN BARCELONO

Regule alvenas al nia sidejo la jenaj revuoj kaj bultenoj: Esperanto, Kontakto, Monato, Heroldo de Esperanto, El Popola Ĉinio, Hungara Vivo, Bulgara Esperantisto, Paco, Bulgario I.T., Franca Esperantisto, Literatura Foiro, Internacia Ĵurnalisto, La Espero, Internacia Pedadogia Revuo, UN kaj NI, Internacia Komputado, Oomoto, HEJS-Juneco, Heroo, Revuo de SEJO, Ĉiesrevuino, Fido kaj Espero, Heleco, Nia Voĉo, Antón Balaguer, Gazeto Andaluzia, Lingua Club, KEG. Sulko, G.E. de Bilbao, Valencia Lumo, La Cenaĉero, Katolika Esperantisto, Tejo-Tutmonde, Koncize, Aŭroro, Libera Trako, Evoluo, Itala Fervojisto, SEI, ILERA' kaj La Grilo.

Koran gratulon al ĉiu el ili.

Samideano Gabriel Mora i Arana, membro de HEF kaj redaktoro en nia Redakcio, gajnis en la pasinta monato decembro la literatura premion "ENRIQUE FERRAN" pri poezio en kataluna lingvo.

Nia elstara verkisto kaj tradukisto en kataluna kaj esperanta lingvoj, aldonas al siaj ricevitaj premioj, ĉi premion, kiu sendube konfirmas lian meriton, kiel unu el la plej altvaloraj verkistoj. Sinceran gratulon!!

**HEF–Sekretario**
**Victor Ruiz**

# PENSOJ DE ŻAMENHOF

**El la parolado en la Guildhall de Londono, 21. Aŭg. 1907. (Originala Verkaro. Paĝoj 382-383)**

La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj, kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! Dum la pseŭdo-patriotismo, t.e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantistoj, kiuj predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri la amo al la patrujo parolas al ni ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo —tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton "amo", ĉar en via buŝo la sankta vorto "amo" malpuriĝas.

**El la parolado de Zamenhof okaze de la Unua Kongreso 1905 en Boulogne-sur-Mer.**

Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion; sed tio ĉi estis nur revo...

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi...

Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonio-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

## DISERTAĴO DE ANTONIO ALONSO NUÑEZ LEGITA DE MANUEL LOPEZ HERNANDEZ EN LA 45a KONGRESO DE HISPANA ESPERANTO – FEDERACIO EN KARTAGENA. (Ekstrakto)

## SOLVO AL KRIZO: ENERGIO ATOM–KERNA, KAJ TAMEN PURA

*(Dua parto)*

Sed ni ne rajtas trompi nin: Malgraŭ la nunaj klopodoj ekspluati ĉiun eblan energi-fonton, ne nur hodiaŭ tiuj renovigeblaj fontoj aparte de hidraŭlikaj faloj ne kovras eĉ 1°/₀-n de la tuto de la konsumata energio, sed eĉ en la jaro 2000 ili ne kovros 2°/₀-jn. Kaj, kio estas plej bedaŭrinde, ke se ni imagas ke oni venas al plena ekspluato de tiaj eblecoj kiel, ekzemple, oni jam faris aŭ baldaŭ faros pri akvofalos ĝi ne povos kovri pli ol 10°/₀-jn de la tuto. Tio estas, plej klare kaj simple dirite, ke ni mizere trompus nin, se ni esperus solvi per tiuj teknologioj la tutan energiproblemon, la tutan energi-krizon, fonton de pli vasta krizo. Ĝi estos nura helpo al la solvo de la kompleta problemo; kaj, ĉar problemo, oni povu kaj uzu ĉiun konatan partan solvon: Ĉio estas bonvena en la kadro de malabundo! (Se fari komparon: Oni ja devas ŝpari energion, oni devas klopodi pri pli racia uzo de energio; sed, certe, per nura ŝparado oni ne solvos la problemon. Nu, kvankam ni estas nun en alia tereno, ĉar temas pri fakta aldono de energikvanto, kaj ne nur pri ŝparado, la fakto estas, ke ni same erare esperus plenan solvon de nia krizo per la diritaj rimedoj).

Tio signifas, aŭ ke la krizo trovos alian pli perfektan solvon, aŭ ĝi daŭre estos minaco por ni: Laŭ unu vojo, la katastrofo trafus la Homaron post nuraj 100 jaroj; laŭ alia, post 200, aŭ 300, aŭ 500. Sed nenikaze la Homaro eskapus la katastrofon, se mankus pli perfekta solvo.

Por fini ĉi tiun lastan komenton, ni diru ke por la nuna tekniko estas neantaŭvideble, ke oni iam povus veni al tiaj gigantaj konstruaĵoj; ke oni apenaŭ trovus sufiĉan material-kvanton por ĝi... kaj sufiĉan energi-kvanton por ĝin munti. Cetere, eĉ tia muntaĵo ne povus koste konkurenci kun la multe pli simpla kaj pli bona solvo, pri kiu ni tuj parolos.

Prezenti al vi skizon pri tio, kio okazas en ordinara atom-bombo (t.e., el uranio kaj parencaj substancoj, kaj ankaŭ en la ordinaraj atom-centraloj (negrave ĉu "klasikaj, lantaj" aŭ ĉu "modernaj, rapidaj" (do, ree temas pri urania brulaĵo, ne hidrogena): Temas pri t. n. "fisio, fendado" de atomoj de difinita uranio-speco, sub la influo de "bombado" pere de sub-atomaj

partikloj. Sub tia bombado, la atomoj krevas, kaj dividiĝas al pli simplaj atomspecoj, samtempe elsendante grandan energi-kvanton... kaj, utile por iuj celoj, sed bedaŭrinde kaj danĝere por aliaj celoj kaj por la homo, grandan kvanton de radiaĵo (vi certe scias pri tio, ke sub la influo de tiuj radiaĵoj oni povas, laŭ la ricevita dozo, jen morti, jen suferi terurajn kancerajn malsanojn, generi kriplajn idojn, ktp.; krome, ke tiu radiaĵo ne estas efemera procezo, sed daŭranta en la cindraĵoj de la fendado, en la internaj partoj de la centraloj, eĉ dum miloj da jaroj).

Kaj bone atentu ke nun la transformo al la atomo okazas en ĝia tuto, en la elektrona ŝelo kaj, ĉefe kaj plej grave, en la kerno. La energi-kvanto el la kerno estas multe pli granda ol tiu en la ŝelo (al tiu ĉi punkto ni devas reveni baldaŭ). Kaj ni diru, ke estis la genia Einstein (Ajnŝtajn) kiu antaŭvidis, per nura uzado de krajono, papero... kaj talento, sen ajna eksperimentado en laboratorio, la ekziston de tiu nova, ĝis tiam nesuspektata energi-fonto.

Nia tria diagramo, celas skizi tion, kio okazas en la t.n. "fuzio, kunfandiĝo" de hidrogen-atomoj al helium-atomoj (temas esence, pri procezo sama al tiu, kiu okazadas en la Suno, kaj el kiu venas la energi-elsendo el la Suno): Sub la efiko de grandaj premo kaj temperaturo (krome, ja okazas reordigo en la elektronaj ŝeloj), kaj samtempe okazas elsendo de grandega energi-kvanto, tamen nun kaj la tre grava eco, ke radiaĵoj ne estas elsendataj (temas do, pri "pura" energio el atom-kernoj; tion ni montras per ne-metado de la ruĝaj buletoj kiuj en la antaŭa diagramo montris al la radiaĵo, kaj ankaŭ per ne-ĉeesto de la internacia simbolo kiu avertas pri danĝero de radiaĵo (heliumo) estas unu el la plej stabilaj atom-specoj ekzistantaj, male al tio, kio okazas ĉe fisio, kies cindraĵo grandparte konsistas el nestabilaj atomoj). (Teorie, en atom-centraloj ajnatipaj povas okazi eksplodo— kio ja signifus danĝeron; sed nur en tiuj uraniaj —ne en hidrogenaj— aldoniĝas radiaĵo.

Kaj ni devas citi tie ĉi tre kuriozan okazon, vere surprizan aferon, kiu montras al ni, kiom da zorgoj oni portas al tio, kiel eviti la radiaĵ-danĝeron: Unu el la plej famaj lingvistoj kaj logikistoj nuntempaj, Tomaso Sebeok, ricevis la mendon, elpensi signaron, aŭ kiun ajn adekvatan rimedon por ke post, ni diru, dumil jaroj, la homoj kiuj ne avertite eventuale trafos la cemento-kovritan restaĵon de antikva atom-centralo, aŭ enkavernan deponejon de radiaĵa atomcindraĵo, tuj sciu —pere de tiu rimedo— pri la danĝero ilin minacanta. (Kompreneble, tia signaro estos superflua se la kulturo ne suferos interrompon parolan, skriban, teknikan (pensu, ekzemple, pri la Geiger-komputiloj (Gajger) per kiuj oni mezuras kaj esploras pri ekzisto de radiaĵoj); sed la afero iĝas netriviala, vere malfacila, se tia kul-

tuta katastrofo iam okazos. (Kompreneble, ankaŭ ke la nuna simbolo por radiaĵo tute ne garantias solvon al la problemo).

Kaj estas nun oportune diri, ke kvankam neniu el ni ŝatas la jam ekzistantan radiaĵ-danĝeron, neniu vere grava akcidento okazis ĝis nun en la atom-centraloj ĉie tra la mondo. Ni povas do, sufiĉe firme kredi pri la efikeco kaj zorgoj de la teknikistoj por nin protekti —por sin protekti ankaŭ— kontraŭ la danĝero. Kompreneble, ni devas celi la malapero de la danĝero, kaj ne al nura ŝirmo kaj protektado kontraŭ ĝi; sed tiun celon oni povas atingi nur per superado, per venko de la nuna krizo kaj situacio, kaj tute ne per rezigno al usado de fonto necesa en situacio de malabundo; kiel ni vidos, bonaj perspektivoj ekzistas por tio. Cetere, la radiaĵ-danĝero havas limon en si mem, kaj baldaŭ atingotan: Ĉar ni jam scias, ke uranio estas la plej malabunda el la ne-renovigeblaj fontoj, ĝi tre baldaŭ elĉerpiĝos, kaj do kresko de la danĝero preter iu difinita limo tute ne estas ebla.

Ni venu al la energi-kvanto liverata dum atom-kernaj fisio aŭ fuzio. Por simpleco, ni parolos nur pri uranio, sed la faktoj same validas por hidrogeno (fakte, hidrogeno estas eĉ pli bona fonto, proksimume duoble bona ol uranio: Se temas pri uranio rekte el la mino, ni trovas ke unu kilogramo da ĝi liveras tiom da energio kiom 10.000 (dek-mil) kilogramoj da petrolo. Se temas pri tiu efika parteto de ĝi kiun oni povas ekstrakti per rafinado (sola kiu vere fisiiĝas), unu kilogramo da ĝi ekvivalentas je unu miliono da kilogramoj da petrolo. Kaj se temus eĉ pri tiu parteto de tiu parteto kiu fine transformiĝas al energio, unu kilogramo da ĝi ekvivalentas je mil milionoj da kilogramoj da petrolo.

Por ke ni faru al ni klaran bildon pri tiuj gigantaj kvantoj, ni pensu pri jeno: Oni kalkulas, ke dum 1990 oni konsumos en Eŭropo energi-kvanton kiu, se ĝi venus nur el petrolo, temus pri mil milionoj da tunoj da petrolo; kaj, do, por transporto de ĝi oni bezonus dek-mil petrol-ŝipegoj (ĉiu, kapabla transporti cent mil tunojn). Se la tuta energio venus el uranio, sufiĉus cent-mil da ĝi; por transporti ĝin sufiĉus unu sola petrol-ŝipego. Se temus pri tiu frakcio de frakcio, kiu transformiĝas al energio, sufiĉus unu tuno, kium oni povas transporti per tute malgranda kamiono. (Laŭ teknika vidpunkto, tamen, ĉi lasta ebleco ne doniĝas, ĉar oni ne povas izoli ĝin antaŭ uzado; ni ĝin citis nur por pli klara kompreno, de la misteroj kaj grandegaj fortoj kiujn la Naturo kaŝas en si).

Ni devas paroli nun pri teknologio, abundo kaj kostoj. Plej evidente, jam delonge funkcianta teknologio ekzistas por fisio de uranio. Sed ĝi ne ekzistas, laŭ industria vidpunkto, por fuzio de hidrogeno; tia teknologio troviĝas ankoraŭ en la stadio de eksperimentado kaj esplorado. Tamen, ja bonaj es-

peroj ekzistas, ke en baldaŭa estonteco oni sukcesos ankaŭ pri ĝi (fakte, estas apenaŭ imageble ke la homo ne sukcesus en tiu tute klare difinita kaj konkreta problemo). Por doni palan bildon de la malfaciloj venkendaj, ni diru: Nenia problemo se temas pri fabrikado de bombo, jen el uranio, jen el hidrogeno. Sed la industria, paca ekspluatado de tiuj fontoj bezonas sukceson en dresado de tiu energio, ke ĝi produktiĝu ne unumomente kaj eksplode, sed grade kaj flue, sendanĝere kaj uzeble por paca, longdaŭra celo. Kaj se ni atentas ke hidrogen-bombo bezonas prajmon, eksplodigilon, konsistantan el urania bombo, ni komprenas, ke paca industrio por hidrogeno estas multe pli komplika afero ol por uranio; fakte, la malfacilo konsistas en tio, kiel gardi en malgranda spaco, sen eksplodo-risko, substancojn sub tiom altaj premoj kaj temperaturoj).

Nun pri abundo: Ni jam scias ke uranio estas la plej malabunda fonto, kaj ke, do, ekspluatado de ĝi venos al tre baldaŭa fino —aŭ, simple, oni ne uzos ĝin se oni volas ĝin ial gardi. Sed la afero tute aliiĝas se temas pri hidrogeno: Ni jam diris ke, kvankam ne-renovigebla, ĝi estas fakte ne-elĉerpebla. Pli konkrete: Oni taksas, ke en la akvoj de oceanoj troviĝas cento da du-ilionoj (hispana "billón"; t.e., unu miliono da milionoj) da tunoj da deŭterio (temas pri ekvivalento de tio, kion ni nomis, en la kazo de uranio, "rafinita"; temas do, nun, pri tiu parto de hidrogeno kiu vere fuziiĝas; ni ne bezonas paroli tie ĉi pri "izotopoj" kaj rilataj aferoj). Nu: Se oni povus ricevi la tutan energion el tiu deŭterio, ni jam vidis ke por Eŭropo sufiĉus en 1990 la enhavo de ŝipeto (1000 tunoj). Se ni supozas ke por la tuta mondo estus bezonata la enhavo ne de unu, sed de cent petrolŝipegoj, tiu mara rezervo sufiĉus por mil milionoj da jaroj. Kaj, kio tre gravas, oni tute ne difektus la maron, ĉar de ĉiu kilogramo da marakvo oni forprenus nur du centonojn de gramo da deŭterio. (Estas vero, ke oni devus poste zorgi pri la cindraĵo, ja ne-radioaktiva, sed gasa (temas pri heliumo). Sed ĉar temas pri tre malgrandaj kvantoj, oni apenaŭ havus problemon. Se oni ne trovus aplikon por ĝi, kaj oni taksos ĝin ĝena aŭ iel danĝera, oni povus eĉ for-ekspedi ĝin al la Suno aŭ al la vakua Universo. (Kaj ja post forpreno de Deuterio la mar-akvo iĝas averaĝe pli malriĉa en ĝi; sed ni preferas la prudentan kaj elementan nivelon de tiu ĉi prelego).

Nun, pri kostoj: Ni jam scias, ke energio el uranio jam ekzistas en la merkato (la elektron tiel produktitan oni simple sendas kune, tra la samaj dratoj, kun la elektro de ĉia origino). Kaj ke la taksoj iras de tiuj, kiuj asertas ke tia energio jam kostas aŭ baldaŭ kostos nur unu trionon de tiu de aliaj originoj, ĝis tiuj, kiuj asertas, ke ĝi estas 40 % pli kosta (kaj ke se oni plu insistas pri ĝi, tio ne venas de ekonomia motivo, sed la militisma pro la rilatoj de uranio, plutonio, k.s. al la

militista sistemo kaj malordo de nia mondo). —Oni scias, ke la teknologio por hidrogeno estas tre kosta komence; sed oni ja supozas, ke kun la paso de la tempo kaj akiro de pli perfektaj konoj kaj sistemoj, tiu kosto serioze malaltiĝos — kiel daŭre okazas por ĉiuj branĉoj de tekniko. Sed. ree plej grave por nia afero, la "brulaĵoj" (t.e., deŭterio estas tre etkosta materialo; oni kalkulas, ke unu kilogramo da ĝi kostos ĉirkaŭ 20.000 (dudek mil) pesetojn en la komenco, kaj certe malpli, poste; nu, se por Eŭropo en 1990 sufiĉos la enhavo de unu ŝipego (cent mil tunoj) ĝia kosto estos de nuraj du du-ilionoj da pesetoj (Alivorte: La elspezoj de nia hispana Socia Asekur-sistemo sufiĉus por pagi la brulaĵ-fakturon de la tuta Eŭropo. Memoru, kompreneble, ke al tio oni devas aldoni la koston de teknologio k.s.).

Ni venas, do, al konkludoj kaj fino. Se ĉio ĝis nun dirita estas ĝusta — kaj ĝi estas tia — la danĝero de vera krizo kaj katastrofo ne nur malaperas de nia horizonto, sed simple ĉesas ekzisti; kio, tamen, tute ne signifas la malaperon de problemoj, ĉar ili plu ekzistos, kaj multaj el ili — teknikaj, politikaj, ekonomiaj, sociaj — estas vere tre malfacilaj kaj doloraj problemoj, por kiuj ni ne havas garantion, ke ni sukcesos ilin solvi. Sed, mi pensas, ke kio pleje gravas estas la fakto, ke ni povas fronti tiun problemaron kun la scio, ke ili ne okazas en kadro de Tero daŭre paraliziĝanta pro manko kaj fine neekzisto de sufiĉa energi-kvanto.

Petrolo unue, (poste, ankaŭ karbo kaj natura gaso) ĉesos esti misuzataj por "malaltaj celoj" de nura brulado, kaj statos rezervitaj por "altaj taskoj" de kemia industrio. Por provizado de varmo, elektro, hejtado, oni uzos ĉiujn renovigeblajn rimedojn (Sun-varmo, tajdoj, vento, gaso el biomaso, ktp) kune kun energio el hidrogena fuzio (kompreneble, uranio ne plu estos uzata por tiaj celoj, negrave ĉu oni ĉesas ĝin uzi, aŭ oni elĉerpos baldaŭ la nunajn rezervojn).

Helaj perspektivoj, do, malfermiĝas antaŭ ni, ĉar ni scias pri solvo de la energio-problemo, kaj fakte solvo definitiva laŭ homa skalo, kaj ke temas pri solvo je nia atingo-kapablo. Ni varme esperu kaj deziru sukceson al teknikistoj pri energio, ja rilate la renovigeblajn fontojn, sed, antaŭ ĉio kaj ĉefe, ...jn fontojn, rilate la hidrogenan fuzion. Ni esperu, ke ni povos vidi la baldaŭan ekfunkciigon de la unua industria atom-centralo de hidrogeno.

Kaj jen, do, kial ni esperas ke mi sukcesis prezenti al vi, kial ni devas esti optimismaj rilate la solvon de almenaŭ la plej grava parto de tiu ĝenerala krizo kiu jam delonge nin vipadas sur plej diversaj kampoj, de tiu parto kiu havas originon en la energio-krizo. Mi esperas tial, ke mi pravigis antaŭ vi la optimisman titolon de mia prelego, laŭ kiu la solvo al la energio-krizo kaj al ĉiuj ĝiaj sekvaĵoj venos pere de atomkerna energio, kaj tamen pura.

DANKON

# 46a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Vigo de la 15a ĝis la 20a de julio 1986
Adreso de la Loka Kongresa Komitato
Círculo Mercantil, strato Príncipe, 44

**LOĜADO**

La kongresanoj disponos por loĝado la restadejon "San Francisco", strato Sta Marta —apud la kongresejo—. Estas disponeblaj unulitaj, dulitaj, trilitaj kaj kvarlitaj ĉambroj. Persona loĝado po 500 p-toj ĉiun tagon.

**SUBVENCIOJ**

La urbestraro de Vigo subvenciis la Kongreson per 15.000 p-toj kaj krome donacos al ĝi 400 ekzemplerojn de luksa, turisma broŝuro pri Vigo. La kongresanoj estas invititaj al oficiala akcepto en la urbodomo kiel programero de la Kongreso.

**ĴUS APERIS**


Koloraj afiŝoj kaj bildkartoj de la Kongreso, subvenciitaj de "La Caja de Ahorros de Vigo". Kiuj deziras ricevi ilin, speciale la kolektantoj, bonvolu tion urĝe peti al la Sekretario de la Loka Kongresa Komitato, s-ro Jaime Camoa.

**LASTA INFORMO**

Aliĝis al la Kongreso 105 geesperantistoj.


**RESIDENCIA**

San Francisco de Asis



LLORENTE, 22
TELFS. 42 53 11 - 42 31 49

36202 - VIGO

# IO PRI NIA NUNJARA KONGRESO

Nia nunjara kongresurbo, kiu jam la jaro 1972 gastigis la Kongreson de la hispana esperantistaro, estas unu el la urboj plej gravaj, aktivaj kaj industriaj de la galega regiono, hodiaŭ Aŭtonomio de Galegujo, evidente krom ĝia tradicia marista.

"O val de Fragoso que é mui fermoso" = La valo de Fragoso, kiu estas tre bela. Nu, en la marbordo de ĉi tiu valo troviĝas nia nunjara kongresurbo.

Vigo posedas riĉan historion, verŝajne estis Ambrosio de Morales, kiu en sia "Ĝenerala Kroniko" diras, ke la nuna Vigo estas la "Vicus Spacorum" de la itinero de Cesar Antonio.

Kiel multaj hispanaj urboj, Vigo estis regata aŭ malvolviĝis influate de la Eklezio aŭ de religiaj ordenoj. La konventoj de la interno de Galegujo regis dum kelka tempo Vigon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn, celante la akiron de freŝaj fiŝoj kaj maraj krustuloj, kiujn ili destinis por la granda periodo de fastado. Vigo apartenis al la monaĥoj de Melon, sed dum mallonga tempo, ĉar baldaŭ Vigo fariĝis propraĵo de la nomita "Mitro" de Santiago de Compostela. En la preĝejo de Tuj estas dokumentoj de la 12a jarcento, en kiuj legiĝas pri Sankta Maria de Vigo. En la jarcento 14a Don Rodrigo de la Luna starigis strangan imposton, kiu nomiĝis "la rajto de mulino kaj kulero". Laŭ la kronikisto Espinosa, tiu imposto estis destinita por subtenado de la militaj ŝipoj, kiuj defendis la marbordon kontraŭ la piratoj, kiel la angloj kun la fama Drake en la jaro 1585, la turkoj en 1617... Fine Vigo estis ĉirkaŭmurigita. Estis en la jaro 1422, kiam je la unua fojo Vigo ricevis la honoron de "Villa" = Urbo, fare de López de Mendoza, ĉefepiskopo de Santiago.

Vigo konis sian precipan malvolviĝon dum la jarcentoj 15a kaj 16a, krom en la epoko moderna, kiel ĉiuj urboj hispanaj. En la 19a Vigo batalis kontraŭ la francoj, kaj Fernando 7a "La Dezirata". Krom la alnomon "Villa" oni donis distinge al nunjara kongresurbo, la alnomon Fidela, Lojala kaj Kuraĝa.

Aparte de la "cantigas" = kanto-poeziaĵoj, de la trobadoro Martin Codax, ne multe restas el la mezepoko. Martin en siaj "cantitigas" reliefigas la maron, la izolitecon, la amon kaj la dancon.

La romanikan arton vi povas ĝui en la preĝejo de Santiago de Bembrive, eble konstruita en la jaro 1200, fare de la majstro Rodrigo. Sed vi, kara kongresano miros pri

la artaĵoj de Sankta Maria de Castrelos, apartenanta al la Kavaliroj de Sankta Johano de Jeruzalemo. En Coruxo ankaŭ ekzistis alia Monaĥejo, kvankam nenio restas el ĝi, escepte de la romanika preĝejo, bedaŭre parto el ĝi difektita de postaj laboraĵoj. De la visigota arto nur restas la arko de Pomxion, sed el la baziliko absolute nenio. Evidente en la preĝejo de Sankta Maria troviĝas multaj kaj valoraj artaj juveloj, kiujn vi, ŝatantoj de la historio kaj arto, sendube vizitos dum via kongresa restado en Vigo.

Ne forgesu viziti la Palacon, Muzeon kaj Parkon de Castrelos, donacitan al Vigo fare de Fernando de Quiñones, riĉa aristokrato naskiĝinta en Romo. Troviĝas en tiu palaco aŭditorio sub libera ĉielo, unu el la plej belaj de Hispanujo, en ĝi oni ludas, en la somera sezono, teatron, baleton kaj galegan folkloron, ĉiam kun granda publika ĉeesto.

El Berbes, estas la antikva kaj marista kvartalo, nepre vizitinda, se vi bone deziras koni la vivon kaj historion de la fiŝkaptistoj. En Berbes troviĝas la plej granda aktivado de la fiŝa komercado. Tie oni aŭkcias la kaptitan fiŝaron, alportitan al la haveno tre frue en la mateno, fare de la famaj galegaj fiŝkaptistoj. Poste specialaj kaj grandegaj kamionoj transportos la bongustajn kaj freŝajn fiŝojn kaj krustulojn al la tuta Hispanujo.

Ankaŭ kiam oni parolas pri la marista Vigo, oni devas emfazi la faman kvartalon de Bouzas, iam sendependa komunumo, kaj hodiaŭ parto de la urbo Vigo. En ĝi estas multaj kaj tipaj trinkejoj, kie vi povas regali vian buŝon per la nekompareblaj sardinoj.

El Castro, estas bela monto, belvedero el kiu oni povas rigardi la grandiozan maran enfluejon de Vigo, ĝi estas historia atestanto de la fama batalo de Rande, en la jaro 1718, inter angloj kaj nederlandanoj je unu flanko kaj francoj kaj hispanoj je la alia.

La Guia, estas promontoro kun malnova historio, hodiaŭ bela kaj moderna parko, ĉirkaŭita de vilaoj kaj elstaraj konstruaĵoj. Karaj kongresanoj vizitu la Guia-n nokte, viaj okuloj fieros rigardante la luman ludon de la urbego Vigo.

Mi supozas, ke la respondeculoj de la kongreso jam antaŭvidis ekskurson al la Insuloj Cies. Se iliaj strandoj estas mildaj kaj ampleksaj ilia historio perdiĝas en la pratempo. Miksiĝas en la historio de Cies, la nomoj de Julio Cesar, la reĝo Alfonso 9a, la angla pirato Drake. Kiam vi troviĝos en la ekskursa ŝipo, ne forgesu rigardi la sablajn panoramojn de Samil, Coruxo, el Bao, la insulojn Torrella, Panjon, strandon Ameriko, la enfluejon de la rivero Miñor, la longan strandon Ladeira..., eble dum la ekskurso vi aŭdos la jenan kanzonon:

Vexo Vigo, vexo Cangas,
tamen vexo Redondela,
vexo a Ponte de Sampaio,
camiño de miña terra.

Mi vidas Vigo-n, mi vidas Cangas-on,
ankaŭ mi vidas Redondela-n,
mi vidas Ponton de Sampaio
survoje al mia lando.

La strato plej populara de Vigo estas "El Príncipe". Vi ankaŭ promenu tra la moderna Gran Via, la strato Policarpio San; tio tre plaĉis al la "Cervantes" de la galega lingvo, la verkisto Otero Pegrayo. Se vi iras al la "rua" = strato Carral, kiu situas sur forta deklivo, vi troviĝos sur taŭga vojo por viziti la placon de la Konstitucio, iri al la Katedralo, al la Laxe, kaj rigardi la pordon de Gamboa, fama en la lukto kontraŭ la franca invado. Se vi deziras ripozi, kaj cerbumi pri la kongresaj temoj, iru al la ĝardenoj de la Alameda, Eijo Garaj, ĉiam apud la maro. Sendube la L.K.K. jam organizis kelkajn ekskursojn, sed permesu al mi sugesti iujn vizitojn: Sotomayor, kun sia impona kastelo, Bayona de Miñor kaj Bayona de Oya, kun sia monaĥejo, la fiŝkaptista urbeto La Guardia...

Evidente vi havos specialan okazon gustumi la konkajn moluskojn, ĉar en tiu aspekto de la gastronomio Galegujo estas vera paradizo. La ostroj, mituloj, palinuroj, kankroj kaj multaj aliaj maraj krustuloj, krom la polpoj kaj trutoj, sendube malfermos vian monujon, ĝuigos vian palaton kaj plenigos vian stomakon, ĉar la galegaj kuiristoj estas majstroj en tiu arto. Vi ne forgesu la viandon, la kapridaĵon de Tierra Montes kaj la bifstekon bovinan de paŝtejoj Moaña aŭ de Meiras. Ĝi estas reĝa manĝaĵo, atentu, vi ne forgesu aldoni la famajn vinojn de Condado de Salvatierra, de Ribeiros, Meder, Condado...

Samideano, iru al Vigo, via bankokonto ne tiom maldikiĝos, sed via vivo estos tre feliĉa.

Krome pri la Kongreso de Vigo oni diras: Ke estas devigo iri al Vigo.

**Luis Serrano Pérez**


# SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
Monata organo de SAT

*– Laborista esperantismo – Kontraŭ rasismo – Kontraŭ faŝismo – Por la homaj rajtoj – Eĥo de sociaj luktoj – Donas la parolon al ĉiuj laboristaj tendencoj...*



Provekzemplero kun abontarifo havebla kontraŭ
internacia respondkupono ĉe:
SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris

# HEJS. ATOCHA 98 – MADRIDO

**JUNULARA SEKCIO DE HEF KAJ LANDA SEKCIO DE TEJO**
**ZARAGOZA – 86**

10a RENKONTIĜO DE HEJS. 27a – 30a DE MARTO
(Provizora programo)

| | | |
|---|---|---|
| ĴAUDO, 27a: | 20a horo: | Interkona Vespero |
| | | Disdonado de dokumentoj |
| VENDREDO: | 10.30a horo: | Oficiala malfermo |
| | 11.30a horo: | Elementa kurso de E-o (1-a sesio) |
| | | Fakaj kunvenoj: Junaj verkistoj |
| | 13.00a horo: | Vizito al la urbo |
| | 17.00a horo: | Ordinara kunveno de HEJS |
| | | Elementa kurso de E-o (2-a sesio) |
| | | Fakaj kunvenoj: KAPE |
| | 21.00a horo: | Distra kunveno en trinkejo |
| SABATO: | 9.30a horo: | Sporta praktikado |
| | 11.30a horo: | Elementa kurso de E-o (3-a sesio) |
| | | Fakaj kunvenoj |
| | 12.30a horo: | Vizito al la Aljafería |
| | 17.00a horo: | Prelegos akademiano FERNANDO DE DIEGO. |
| | | Eventuala posta debato |
| | 20.00a horo: | Komuna foto |
| | 21.30a horo: | Kuna noktomanĝo |
| DIMANĈO: | 11.30a horo: | Elementa kurso de E-o (lasta sesio). |
| | 12.30a horo: | Debato (kiel atingi bonan lingvokapablon) |
| | 17.00a horo: | Fermo de la Renkontiĝo |



# 71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

PEKINO, ĈINIO, 26an julio – 2an aŭgusto, 1986
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176.
NL – 3015 Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: p/a ĈINA ESPERANTO–LIGO
P.O. KESTO 825, BEIJING, PR. ĈINIO

Prezidanto de la Honora Komitato, s-ro Huang Hua, la unua ĉina ambasadoro ĉe UN.

**Statistiko:** Ĝis la 21a de novembro estis enskribitaj 1054 aliĝintoj el 49 landoj. El Hispanio 19.

**Kotizoj:** Individua membro de UEA 187,50 gld = 9.800 p-toj.

**Vojaĝoj:** La flugo el Hispanio al PEKINO kaj reflugo kostos ĉ. 150.000 p-tojn, kaj la LKK rekomendas faru tuj, kaj ne lastmomente, la demarŝoj pri la loĝado kaj ekskursoj en PEKINO.

**HISPANA DELEGITARO:** Ankoraŭ oni ne decidis, kiuj aliĝintoj al la 71a UK reprezentos nian landon; interesiĝantoj bonvolu skribi al la HEF-sekretario en Barcelono por pritrakti, kiujn taskojn ili povos plenumi en PEKINO.

**42a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto.**
Adreso de la LKK: 42a IJK POK. 22041
IL–61220 TEL–AVIV, ISRAELO.

**KONDIĈOJ:** La plena kongreskotizo rajtigas loĝadon, manĝojn kaj partoprenon en ĉiuj kongresprogramaj aranĝoj. Kiel aliĝdato validas la dato de ricevo de la kompleta pago.

**KOTIZOJ:** Aliĝo ĝis la 1a de majo: ĝis 21 jaroj .......... 15.000 p-toj.
ĝis 26 jaroj .......... 20.000 p-toj.

Petu pliajn informojn al la LANDA SEKCIO DE TEJO en Hispanio: HEJS, strato Atocha 98, 4. MADRIDO.

# 59a SAT KONGRESO DE ESPERANTO
# San Cugat del Vallès (Barcelono)


**De la 2a ĝis la 9a de aŭgusto, 1986.**

SKIZA PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton, 2an aŭgusto: Interfratiĝa vespero.
Dimanĉon: Solena malfermo. Vizito al la Monaĥejo. Teatraĵo.
Lundon. Unua laborkunsido. Fakaj kunvenoj. Vizito al Barcelono.
Marton: Fakaj kunvenoj. Amuza vespero.
Merkredon: Parolado. Fakaj kunvenoj. Vizito al Muzeoj de Sabadell kaj Terrassa.
Ĵaŭdon: Tuttaga ekskurso al Montserrat kaj Sant Pau d'Ordal, kie oni vizitos la Hispanan Muzeon de Esperanto.
Vendredon: Rezolucia laborkunsido. Fermo de la Kongreso.
Sabaton, 9an aŭgusto: Ĝis revido!
En la liberaj horoj okazos "Artaj, Sciencaj kaj Kulturaj Horoj.

**Kongreskotizoj en pesetoj.**

| | Aliĝo ĝis 31-3-1986 | Aliĝo post 1-4-1986 |
|---|---|---|
| SAT-membro | 5.000 | **5.500** |
| SAT-geedzoj | 8.500 | **9.500** |
| SAT-junuloj 15-25 jaraĝaj | 2.500 | **2.500** |
| Gastoj | 6.750 | **7.500** |
| Gastoj junuloj 15-25 j. | 3.000 | **3.000** |



– Subtenantoj pagu laŭvole, sed kiu pagos minimume 2.000 pesetojn, tiu rajtos ricevi la kongresmaterialon.
– Viajn pagojn por la 59-a SAT-Kongreso, bonvolu sendi per registrita ĉeko de via banko aŭ ŝparkaso al ASSOCIACIÓ CULTURAL ESPERANTISTA-59-a SAT-Kongreso, kontnumero 900-11357-19 BANC DE SABADELL - Sabadell (Barcelono); aŭ per poŝta ĝiro al la kasisto Vicente Hernández Llusera, Av. Onze Setembre 59, Sabadell (Hispanio).
– La kotizo ne estas repagebla se la kongresano ne ĉeestas la kongreson.
– La aliĝilo kaj restadrezervigo estas traktata post ricevo de la koncerna pago.
La Antaŭkongreso en "Valo Ordesa" (Aragona Pireneo) 26.07 – 01-08-1986
Informojn kaj aliĝilojn petu al la ORGANIZA KOMITATO.
K-do Antonio Marco Botella. Av. Compromiso Caspe 26 E-50002 ZARAGOZA.

# POEZIA ANGULO

## KARNAVALO

**Al Maria Markova**

Bakanal'! Parade dancu
ĉar jen: alvenis Karnaval'!
Amuzu, moku, furioze
senbridiĝu. Gaj' eluzu
Simieske tiun revenkon
paganan. Impete, groteskte
Batu ĉian falsan konvencion,
senmaskigu per maskoj ĝin! Ŝatu
Glorojn de libero en tagoj
efemeraj. Baldaŭ morojn
Rigidajn. Invadu la stratojn,
festumu festenojn senbridajn,
Psikon liberigu kaj korpon
Adoru fervore la riskon.
Rapidu, ĉar fasto karesma
galopas. Plezuron avidu!
Karnaval' fariĝas la vivo
kiam martumas Karnaval'!

**Johano Vélez**

## ĈE STELOJ...

Antaŭtempe, mi serĉis ĉe la nokta dekoro,
tra la senfunda fundo de la nigra senfino
iun stelon magian, kiu, –bona feino–
realigus la revojn de mia juna koro.

Ĉiu kometo brila tra l' tuta firmamento
jam ŝian nomon konis kaj la deziron mian,
sed neniu plenumis ĉi esperon pasian
kaj tra la temp' sveniĝis la romantika sento.

Ankoraŭ, mi denove la ĉielon rigardas
kiam serena nokto la nigron steloplenas
kaj ĉe la kor' eniĝas nedefinebla tristo.

Sed nun, revajn dezirojn la koro ne plu gardas
kaj nur la nomo ŝia al la memoro venas
kun romantika, dolĉa, senespera persisto.

**José F. Arroyo**
**(Originale en E-o)**

# 47a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

**Madrido de la 16a ĝis la 20a de Aprilo 1987**
**SUB LA HONORA PREZIDANTECO DE LA HISPANA REĜO JUAN CARLOS 1a**

**LOKA KONGRESA KOMITATO, Atocha 98, 4°, 28012 – Madrido**

Prezidanto: Augusto Casquero de la Cruz
Sekretariino: Ana Montesinos
Kasisto: Francisco José Platas
Eksteraj rilatoj: Gian Carko Fighiera

MADRID 500




Kara samideano: Kiel vi jam scias, en la jaro 1987, Jubilea Jaro, okazos en Madrido, la 47a Hispana Kongreso de Esperanto, sub la Honora Prezidanteco de la Hispana Reĝo Juan Carlos 1a.

Ni ĉiuj deziras, ke tiu kongreso montru al ĉiu ne esperantisto, tion, kio estas Esperanto kaj kiaj estas la esperantistoj.

Tamen, por bone atingi la celojn, ni bezonas la helpon de ĉiu esperantisto en Hispanio. Kaj la unua helpo devas esti la aliĝo kaj partopreno en la kongreso.

Ĝis nun la meza kvanto da partoprenantoj en niaj hispanaj kongresoj estis 300. Por la Jubilea Jaro, ni esperas atingi minimume 500. Por tio, estas necese ke ni ĉiuj aliĝu, sed NUN, la frua aliĝado, helpos la organizantojn por pli bone, brile kaj sukcese organizi ĝin.

Tiel do, ne atendu ĝis la lasta momento, ALIĜU JAM, kaj konvinku viajn samgrupanojn al baldaŭa aliĝo.

La JUBILEA JARO devos esti la JARO DE ESPERANTO en Hispanio.

Ni atendas vin en Madrido.

Elkorajn salutojn, kaj ĝis baldaŭ

**LOKA KONGRESA KOMITATO**

# LA KOTIZOPAGOJ

Jam de kelkaj, jaroj mi okupiĝas pri la kolekto de kotizoj por diversaj esperantaj revuoj, ĉu enlandaj, ĉu internaciaj. Mi devas konfesi, ke tiu tasko tre plaĉas al mi, tamen estas momentoj en kiuj mi ĉagreniĝas, kiam la tagoj kaj la monatoj forpasas kaj la atendataj pagoj de la kotizoj ne alvenas.

Evidente, multaj esperantistoj ne meritas ĉi tiujn kritikojn, sed la vero estas, ke granda procento de la esperantistaro tre neglektas la pagon de la abonoj al la revuoj kaj la kotizon de sia membreco. Tio ja estas vera malhelpo por la bona funkciado de ĉiu organizaĵo.

Hodiaŭ la Esperanto-movado vivas danke al la mona subteno devenanta de sia membraro. La oficialaj helpoj, almenaŭ en la nomataj okcidentaj landoj, estas sensignifaj. Do se la membroj ne sendas akurate siajn kotizojn aŭ abonojn kaj eĉ la donacojn, la financa planado por kiu ajn organizaĵo fariĝas tre malfacila, komplika kaj riska por la respondeculoj.

Ofte ne gravas la kvanto da membroj, sed tio, kion vere deziras koni la respondeculoj de kiu ajn esperantista organizaĵo estas la financa rimedo... por la longa jaro, kaj surbaze de tiu monkvanto starigi la akdekvatan buĝeton. Se ne ekzistas bona organizo de la monaj rimedoj, neniu societo sukcesos.

La ĝustatempa alveno de la abonoj kaj kotizoj estas kuraĝigilo por tiuj samideanoj, kiuj tiom entuziasme laboras por nia idealo. Do, mi petas al vi ĉiuj, karaj gesamideanoj, pagu viajn abonojn akurate, sendu tuj la kotizojn al la organizaĵoj al kiuj vi apartenas. Tamen se ial vi ne plu deziras aboni revuon aŭ aparteni al iu organizaĵo bonvolu tiun tuj sciigi, jes kara amiko, eĉ tiumaniere vi helpas la laboremajn esperantistatojn.

Estas jaroj, en kiuj 40 procentoj de la membraro ne pagis sian abonon, dum la tempo anoncita de la revua administrejo. Tio estas terura dubo por la administrantoj, ĉar oni ne scias, kiom da revuonumeroj oni devas eldoni. Jes oni povas sendi la revuon remburse, sed tio estas malbona solvo, ĉar la afranko tre plialtigas la prezon. Krome se la remburso estas resendita, la kostoj fariĝas multe pli altaj. Estas la poŝta ĝiro la plej bona pagosistemo, aŭ pere de bankoĉeko, se via banko ne postulas kroman pagon por trakto de la ĉeko.

Anekdote, mi rakontas al vi agon de samideano, kiun neniel vi devas imiti; ĉar mi estis certa, ke li ricevis la revuojn, je la mezo de la jaro mi persone petis al li la koncernan pagon. Li ne volis pagi al mi kaj inter aliaj senkulpiĝoj li diris: tio estas kiel en UEA, se oni ne pagas dum pluraj monatoj, fine ili ne plu sendas la revuon kaj ĉio estas finita. Ne imitu lin, estu honesta.

**Luis Serrano Pèrez**

# REE PALINDROMOJ !!

Publikiginte kolekton da ili en la organo de HEF, sincere mi ne povus supozi, ke ekzistas tiom da kuriozaj kaj senchavaj frazoj ambaŭdirekte legeblaj. Feliĉe, post mia alvoko en BOLETIN de marto-aprilo nunjara, mi ricevis rekte de d-ro Olavide, el Zaragozo, konsiderindan nombron da palindromoj, zorge kompilitaj aŭ mem eltrovitaj de li. Sekve, danke al lia afableco, mi transkopiis por la legantoj de BOLETIN jenan duan liston da palindromoj:

**En kastilia lingvo:** "Lata fatal (sin anís)"; "Siete metéis (son alanos)"; "Amor a Roma"; "Nadas a Caracas, Adan"; "La musa mima su mal"; "Sabadell amaba; mal le dabas"; "A mamá Roma le aviva el amor a papá, y a papá Roma le aviva el amor a mamá".

**En Esperanto:** "Jaroj oraj"; "Kaŝa ŝak' "; "La mina animal' "; "En am' soneton Otono (1) tenos mane"; "... vorto, verki, vero, valo; kun nuko, lavo, revi, krevo, trov' ..."; "En bus'; sub, ne!"; "i (2) latine brua, la urb' en Itali' "; "Sur NATO (OTAN), rus' ?"; "Nepa pen' "; "Kola lok' "; "Mara ram' "; "Voma mov' "; "Dia id' "; "Roka kor' "; "Kova vok' "; "Nila lin' "; "Oskula lukso"; "Tra malam', art' "; aŭ "Tra la malam' al art' "; "Oni amas nin... sama ino"; "Ter' aromas samas amora ret' "; aŭ "Ter' aroma: amora ret' "; "Amota urb' ... nun bru' atoma"; "En maj'; nun jam ne"; "Sone, tamen, maje, kuris al urbo inoj; unu jonio brulas; iru, ke jam ne matenos"; aŭ "Sane..... matenas"; "Moka kom' "; "Moda dom' "; "Kafa fak' "; "Vera rev' "; "Lita til' "; "Barka krab' "; "Luma mul' "; "Ŝuta tuŝ' "; "Gala lag' "; "Luna nul' "; "Nuda dun' "; "Mita tim' "; "Lekata kel' "; "Malfama flam' "; "Onana nano"; "Opaka kapo"; "Orelo, kolero"; "Oreleto, telero"; "Luka kul' "; "Kulpus sup', Luk' "; "Amerika, akirema!"; "Same ili emas"; "Li meritas, satire, mil"; "Lin eĉ baras arab' ĉe Nil' "; "Karb', jako kaj brak' "; "En oro do, odoro... ne!"; "Ni ĝuu ĝin!".

Kaj mi finu, por ke tiu ĉi listo ne fariĝu tro longa, tiom pli, ĉar lastmomente mi ankoraŭ ricevis, de D-ro Olavide, kroman liston, kies publikigon mi provizore rezervas por alia okazo

**V. Hernández Llusera**

(1) Otono = Propra nomo (Wannemakers p. 20).
(2) 1 = 4 MII por itala lingvo (PIV p. 406).

# HEF – SIDEJO EN BARCELONO

La translokiĝo de la sidejo de HEF al la barcelona urbo, able okazigis kelkajn erarojn en la adresaro. Pro tio, ni petas al la membroj, kiuj ne ricevis kelkajn el la lastaj 5 bultenoj de la pasinta jaro, bonvolu informi nin pri kiun ekzempleron ili ne ricevis, tuj la sekretario sendos la bultenon.

Kiam vi sendas poŝtan ĝiron, aŭ ĉekon al la konto en nia ŝparkaso aŭ al nia sidejo, bonvolu sendi samtempe leteron, indikante vian adreson kaj kion vi paĝas. Ĉar oni konstatis, ke kelkefoje la Ŝpara Kaso perdas la kvitancon, kaj malgraŭ tio ke la kotizo eniras en nian konton, oni ne scias la personon, kiu sendis ĝin.

Se vi leganto, jam sendis vian kotizon, faru same, tiamaniere ni posedos vian ĝustan adreson por prepari la novan adresaron.

La disvendado de la NACIA LOTERIO estis sukcesa; koran dankon al la kunlaborantaj asocioj de: Alicante, Girona, Manresa, Madrid, Santa Coloma de Gramanet, Barcelona, Sabadell, Terrassa, Sant Pau d'Ordal kaj Valladolid.

Sinceran gratulon al la membroj, kiu tre ofereme kunlaboris individue en la disvendado de la loteribiletoj, speciale mi mencias gesinjorojn: Agustin Boix, Andrés Falcón, Pere Morató, Vicente Hernandez, Luis Serrano, Anna Cardo kaj Anna Pedrola.

Memoru, ke BOLETIN akceptas komercajn anoncojn sur la kovrilo, en la lasta paĝo.

**PREZOJ** Tutpaĝa anonco: 15.000 p-tojn
Duonpaĝa anonco: 8.000 p-tojn
Kvaronpaĝa anonco: 5.000 p-tojn

Specialaj prezoj por membroj de HEF, Petojn kaj pagojn sendu al: HEF Carreras Candi34, 08028-Barcelono.

**NOVAJ MEMBROJ**. En januaro aliĝis la jenaj samideanoj: Fernando de Diego, Pablo José Romero, Stella de Caspary, Teodoro Ibañez, Francisco Gimenez, Cayetano Mir kaj Javier Fernández.

**NOVA TURISMA INFORMILO DE BARCELONO**

Ĵus aperis en la turismaj agentejoj, turisma informilo pri la barcelona urbo, eldonita de "Patronat Municipal de Turisme, Av. Paral-lel 202, 08015-Barcelono, tel. (93) 223 24 20, kunlabore kun Hispana Esperanto-Instituto.

Gratulojn al nia membro s-ro J. Climent, pro lia sukcesa agado.

**HEF – Sekretario**
**Victor Ruiz**

# UNIVERSALA ESPERANTO – ASOCIO

**Kotizoj por 1986**

| | | |
|---|---|---|
| MG | Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-Movado | 420 p-toj |
| MJ | Individua Membro kun Jarlibro | 1.040 p-toj |
| MA | Individua Membro Abonanto (ricevas Jarlibron kaj revuon Esperanto) | 2.600 p-toj |
| MJ–K | Individua Membro kun Jarlibro kaj revuo Kontakto (por personoj ĝis inkluzive 25 jaraĝaj) | 1.040 p-toj |
| MA–K | Individua Membro Abonanto (ricevis Jarlibron kaj revuojn Esperanto kaj Kontakto) –por personoj ĝis inkluzive 25 jaroj | 2.600 p-toj |
| SA | Abono al revuo Esperanto, sen membreco en UEA | 1.560 p-toj |
| Kto. | Abono al revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO | 780 p-toj |
| SZ | Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio sen membreco | 5.200 p-toj |
| PT | Patrono de TEJO pagas duoble Kontakto (sed ricevas nur unu abonon) por subteni TEJOn | 1.560 p-toj |
| DM | Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo de MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto kaj se kaj dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, la revuon Kontakto | 65.000 p-toj |

**Klarigo**

MG Temas pri nova, eksperimenta, kategorio kun membreco por la venontaj tri jaroj. De nun eblas aparteni al la individua membraro de UNIVERSALA ESPERANTO–ASOCIO kontraŭ la malalta kotizo de 420 ptj. jare. La novaj membroj MG ricevos, krom la membrokarto, ĉ. 100-paĝan depresaĵon de la Jarlibro, kiu nomiĝos "Gvidlibro tra la Esperanto-movado" kaj estos tiu parto de la tradicia Jarlibro, kiu ne enhavas la adresaron de la Delegita Reto.

Kompreneble, la **kompleta** Jarlibro aperados daŭre por la tradiciaj membrokategorioj de UEA.

Ankaŭ MG ricevos ĉiujare la Estraran Raporton pri la agado de UEA, rajtos partopreni ĝeneralan voĉdonadon kaj do estos plenrajtaj individuaj membroj de la Asocio.

## Grava rimarko

Notu ke ankoraŭ restas validaj konataj rabatoj por kolektivaj abonoj al revuo **Kontakto**, kiu daŭre aperos kun paĝoj verkitaj en facila Esperanto. Minimuma mendo: 10 ekzempleroj. Rabatoj: 40°/₀ per individua sendado de la revuo; 60°/₀ per sendo de ĉiu numero en unu sola pakaĵo. Mi aparte rekomendas ĉi lastan solvon, kiu kostas **nur** po 312 p-tojn ĉiu ekzemplero. Jarkolekto: 6 numeroj, kiu venontjare estos dediĉitaj por jenaj temoj: Ĥora kantado; Ĉinio; Reviviĝo de lingvoj kaj de etnaj kulturoj; Morto; Arto kaj literaturo.

---

CONCELLO DE VIGO

CULTURA

| | |
|---|---|
| DATA / REFERENCIA | 18 de decembro de 1985 |
| ASUNTO | acordo Comisión Cultura |

DESTINATARIO

SR.D.JULIO BUENO CORTES
Pi y Margall, 85-1º

C I D A D E.-

O Ilmo.Sr.Alcalde, a proposta da Comisión de Cultura,acordou:

" CONGRESO ESPERANTO.- Examinado o escrito do grupo esperantista "PACO KAY AMO" de Vigo, a Comisión por unanimidade decide aceptar a recepción oficial por parte do Concello de Vigo, dunha representación delegada do Congreso, a entrega de // 400 exemplares do plano turístico de Vigo e subvención da impresión de postales coa vista do Museo de Castrelos para o Congreso por importe de 15.000 (QUINCE / MIL) PESETAS.-"

O que comunico a Vde. ós efectos pertinentes.-

O XEFE DA SECCION,

BIEITO LEDO

# LA FAMILIO DE PASCUAL DUARTE

**CAMILO J. CELA**
Traduko de Fernando de Diego. Eldono de Barcelona Esperanto-Centro. 1985, 163 paĝoj. Formato 18 x 11 cm Prezo 650 p-toj. Mendebla ĉe libro-Servo de HEF

Camilo J. Cela estas la plej elstara nuntempa verkisto hispana. La romano "La familio de Pascual Duarte", aperinta en la jaro 1942, signis turnopunkton en la hispana literaturo, tiam stagnanta post nia kruela fratmilito. Do, kaj la graveco de la aŭtoro kaj la signifo de la verko eksplikas kial ĝia elekto por traduko al esperanto estis trafa decido de Fernando de Diego. Ne vane "La Familio..." jam tradukiĝis al pli ol dudek lingvoj.

La verko estas romano fatalisma. Pascual rakontas unuapersone sian propran historion, siajn sangajn farojn kaj krimojn, kaj kulpas la faton, dum li restas en prizono atendante pagi sian ŝuldon.

Kelkafoje oni divenas en la fundo de lia animo iujn difuzajn bonajn ecojn. Tamen, ia terura krueleco puŝas lin al krimoj senkompataj. Mizero, ignoranteco kaj izolo estas la sociaj ingrediencoj en kiuj sin movas la familio de Pascual. Okazas la dramo en tre povra regiono de Ekstremaduro, en Hispanio, apud la portugala landlimo.

La stilo montras unuavide fortan influon de aliaj klasikaj kaj modernaj hispanaj verkistoj sur la tiam juna aŭtoro. Klaraj spuroj de la Ĉefpastro de Talavera (15a jarcento) troviĝas en la oftaj inversioj Subjekto —Komplementoj— Infinitivo, kiuj donas specialan arkaikan guston al la tuta verko. Aliaj trajtoj memorigas pri "El Lazarillo de Tormes" kaj la hispana pikaresko de la 16a. El la modernaj autoroj, Unamuno per sia "San Manuel Bueno, mártir", transvidiĝas en la strukturo de la romano, kaj eĉ kelkaj el la dialogoj, sobraj kaj trafaj, ŝajnas emani el la lirikaj paĝoj de García Lorca.

Sintakso kaj leksiko de la verko baziĝas sur parolmanieroj popularaj, kiel korespondas al la kruda personeco de la protagonisto, tamen sen slangaĵoj. Ambaŭ, leksiko kaj sintakso, estas artisme ellaboritaj de la aŭtoro. Konsekvence, la popola kaj kulturita planoj de la uzata lingvo unuiĝas en tersa kaj tre vigla rakontado. Rapida esprimiveco, foje pasia kaj tumulta, pelas la leganton de paĝo al paĝo ĝis la fino de la libro.

Tia estas la teksto, kiun tradukisto metis antaŭ sin por ĝin esperantigi. Kiam rezulton li atingis?

S-ro Fernando de Diego faris vere skrupulan laboron. Neniun obstaklon li preterpasis en la traduka-

do, kvankam certe tiaj obstakloj multas pro la populara parolstilo de la rakontanto.

Li aplikis sian propran filozofion pri tradukarto, kiu respondas al koordinatoj tre malproksimaj al tiuj de Kabe. En ĉi verko, De Diego rektigas la menciitajn inversiojn de la originalo, per kio parte malaperas tia arkaika, pikareska gusto kiu spicis la libron. Eble ĉar tia sintakso povus ŝoki ne hispanajn orelojn:

"La conciencia tranquila la tengo". Mia konscienco trankilas.

"Cuando de allí salí". Kiam mi eliris el la stalo.

Pascual uzas tre abunde zoologiajn komparojn kaj popularajn proverbojn, kiujn la tradukisto fidele respegulas:

"... rendida y dócil, como una yegua joven". ...venkita kaj obeema, kiel juna ĉevalino.

"como si fuese una culebra". Kiel kolubro.

"como si fuese una rata". Kvazaŭ rato.

La svarmantaj proverboj, kiuj foje aperas eĉ en triopaj grupoj, prezentas gravan problemon al la tradukisto, ĉar ili povus perdi parton de sia esprimiveco en la traduko. De Diego lerte solvis la problemon, iam per laŭvorta traduko, iam pere de pure esperanta anstataŭa proverbo:

"El pez muere por la boca / quien mucho habla mucho yerra / en boca cerrada no entran moscas". — Kiu multe babilas diras multon neutilan / pro tro da parolo perdiĝas la kolo / en fermitan buŝon ne enflugas muŝo.

La formoj "dronintus, okazintus" kaj similaj aperas tra la tuta verko.

Pli konfliktiva afero estas la leksiko de la traduko. Ĉiu vivanta lingvo —kaj ĉi regulo ne havas esceptonŝ— troviĝas en konstanta ŝanĝo, kaj meti limojn al tiu signo de vivanteco estus absurdaĵo. En la traduko de De Diego aperas multaj novaj vortoj, kiun sendube vekos surprizon kaj eĉ koleron en kelkaj esperantistoj. Tamen, verkistoj estas naturaj lanĉantoj de novaj formoj en sintakso kaj leksiko. Tiajn formojn sankcii aŭ forĵeti estas ja la suverena rajto de la esperantista popolo.

Mi nur menciu, ke la uzo de "nul" anstataŭ "neniu", povus eble agadi kiel lancopinto por endanĝerigi la tutan sistemon de la tiel nomataj "tabelvortoj", kiu ne estas arbitra elpensaĵo de Zamenhof, sed ĝerme troviĝas en la hindoeŭropa lingvo de antaŭ jarmiloj.

Entute, la traduko de "La familio de Pascual Duarte" estas ĝojiga evento por la esperantista literaturo, kaj la senlaca laboro de Don Fernando de Diego meritas, unufoje plu, nian plej senrezervan aplaŭdon kaj gratulon.

JES

# PAROLU E-ON.

*PAROLU E-ON. De José F. Arroyo. Formato 30 x 22 cm, 48 paĝoj, kun desegnoj de Carlos F. Arroyo. Metodo por aŭtodidakta lernado de la Internacia Lingvo Esperanto. Eldonis: Tiempo de Ediciones, S.A. Madrid, Prezo 500 p-toj.*

Jen nova elementa lernolibro de Esperanto por hispanlingvanoj, eldonita okaze de la Internacia Junulara Jaro. Ĝi estas bel– kaj modernaspekta pri prezento ekstera kaj pri ĝia enhavo.

Tiu verko konsistas el historieto prezentita per plaĉaj komiksaj desegnoj, dividita laŭ dek kvin partoj kaj lecionoj. Laŭlonge de tiuj lecionoj, kiuj samtempe estas komentarioj pri la argumento sinsekva de la bildoj kaj de ĉiuj novaj bazaj leksikonaj vortoj, la aŭtoro prezentas iom post iom la precipajn partojn kaj trajtojn de la gramatiko de Esperanto per priskriboj kaj klarigoj en hispana lingvo, laŭ maniero tre simpla kaj klara. Jen bona maniero por memlernado –por ekkoni la veran gravecon kaj la senfinan esprimkapablon de la Internacia Lingvo.

Laŭlonge de la tralegado mi malkovris kelkajn preserarojn kaj eraretojn. Estus bone, por reeldono, fari la konvenajn korektojn:

Paĝ. 12: "la kunveno komenciĝos...". Ne. "la kunvenon...".
Paĝ. 13: "ĉiun tagon mi studas...". Ne "ĉiu tago...".
Paĝ. 14: "Kiom da partoprenantoj...", pli bone ol "Kiom partoprenantoj...".
Paĝ. 14: Por elementa kurso pli bone estus "vi devas plenigi tiun (aŭ "ĉi tiun") aliĝilon" ol, tute simple, "ĉi...".
Paĝ. 15: Ne "Kia tago estas hodiaŭ? Hodiaŭ estas dimanĉo", sed "Kiu...". (Laŭ logiko, "Kia tago...? La kvara de aprilo", aŭ "Hodiaŭ la tago estas venta". "Kiu tago...? Hodiaŭ estas dimanĉo".
Paĝ. 16: "Kunporti". Ne "Kumporti".
Paĝ. 20: "Kion vi pensas pri tio...", sed ne "Kiom...".
Paĝ. 22: Ne "globo", sed "balono".
Paĝ. 24: "Hodiaŭ estas bonega vetero". Pli bone: "Hodiaŭ la vetero estas bonega".
Paĝ. 29: Mankas supersigno ne "anstataŭi" kaj "anstataŭo".
Paĝ. 32: Same, en "sufiĉe".
Paĝ. 32: Ne "doni al vi tiun belan pokalon kiel trofeo", sed "... kiel trofeon".
Paĝ. 33: Bone estus klarigi ke plej bone estas "ne manĝante kaj trinkante", anstataŭ "sed manĝi kaj trinki".

PAROLU E-ON ŝajnas al mi tre altira, trafa kaj konvena libro por komencantoj.

**O. MORA I ARANA**





PAROLU ĈION

Verkita de

JOSÉ F. ARROYO

Eldonita de "Tiempo de Ediciones".

PREZO 500 PESETOJ

Mendebla, ĉe Libroservo de Hispana E. Federacio, poŝtkesto 119, 47080 VALLADOLID

Aŭ rekte al la verkisto J.F. Arroyo, Av. Llano Castellano n-ro 11 7a, 28034 MADRID


---

"Al mi multege interesas la Bahaa movado. Ĉar ĝi estas unu el la grandaj mondmovadoj kiuj, simile al nia, insistas pri la frateco de la homaro. Ĝi alvokas, al ĉiuj homoj, ke ili komprenu unu la alian kaj ke ĉiu lernu ami ĉiujn aliajn.

D-ro L.L. Zamenhof

(3an septembro 1913)


Ĉu vi deziras koni ĉi tiun movadon, kiu laboras por atingi, inter aliaj aferojn, starigi la unuecon de la homaro per Universala Lingvo? Skribu al poŝkesto 395 de Cartagena (Murcia) kaj vi ricevos, kiel eble plej baldaŭ, senpagan informilon.

Dankon